# tejo:aktuale

n°502 | Marto 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon. Jen via raporto pri la plej freŝaj novaĵoj de la TEJO-mondo**. Ĉu vi sopiras renkontiĝi kun esperantistoj en la plej grandaj internaciaj eventoj de la jaro? Ĉu vi volas montri vian talenton al la legantoj de Kontakto? Aŭ scii kion TEJO faris lastatempe kaj kiel aspektas studsesioj de TEJO? Jen la nova numero de **TEJO-aktuale** kun ideoj, inspiro kaj informoj por vi.

## EVENTOJ




**Kune por inkluziveco**

En februaro okazis **studsesio** de TEJO ĉe la Eŭropa Junulara Centro de Budapeŝto, per la subteno de la Junulara Departementejo de la Konsilio de Eŭropo (KdE), pri **inkluziveco kaj kontraŭbatalo de diskriminacio.**

La sesio okazis en Esperanto kaj la angla, kun samtempa interpretado.

Legu pri la evento ĉe tejo.org/artikolo-tejo-studsesio-2025/.

## ALVOKOJ




La Fonduso “Partoprenu IJK-n” de TEJO helpas junajn esperantistojn kun malfacilaj ekonomiaj situacioj ĉeesti nian kongreson, dum kiu diversaj aktivaĵoj **kapabligas** ilin kaj **instigas** ilin al **plukontribuado al nia movado**. Ni esperas, ke ĉi-jare, vi denove subtenos la fonduson en ĝia ĉiama misio, sed kun speciala investo en aziaj kaj oceaniaj junuloj.

Pro la donemo de pluraj el vi ni jam plenumis pli ol 8% de nia celo por la ĉi-jara celo de la IJK-fonduso.







**Ĉu vi IJK-umos kun ni?**

Pli ol 100 homoj aliĝis al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), okazonta **de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025** en **Cisarua, Indonezio**. Ĉu vi volas ĝui IJK-n kun ni, sed ne disponas la rimedojn? Ĉu vi pretas kontribui al la programo kaj organizado de la kongreso?

Vi povas kandidatiĝi por la konkurso **Partoprenu IJK-n** por ricevi financan subtenon! Rapidiĝu, la limdato por kandidatiĝi estas hodiaŭ.

Legu la plenan alvokon ĉe tejo.org/konkurso2025.




**Ĉu vi kundividos vian bildrakonton en Kontakto?**

La revuo Kontakto serĉas **bildstriiston** por fari mallongan duonpaĝan rakonton por la revuo ekde la numero 323 (2025:2)!

Se vi volas kunlabori pri tio, sendu via(j)n verkaĵo(j)n al kontakto@tejo.org **ĝis la 6-a de aprilo 2025.**

## VENONTAJ EVENTOJ




**Partoprenu en la plej granda evento por esperantistoj!**

La 110-a Universala Kongreso okazos en **Brno, Ĉeĥio, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto**. TEJO-membroj ĝuas favoran aliĝkotizon!

Krom la ĉefa programo de UK, vin atendas ankaŭ speciala **junulara programo** kun vesperaj kaj distraj programeroj, ekskursoj kaj multe pli.

**La dua aliĝperiodo finiĝas la 31-an de marto!** Eksciu pli kaj aliĝu: uk.esperanto.net

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**




Aprilo estos plena je klasikaj esperantistaj spertoj: retaj debatoj, lingvaj dilemoj, kaj la eterna demando "Kiam estos la Fina Venko?" Kio ajn via signo, certiĝu, ke vi havas sufiĉe da kafo kaj pacienco por alfronti la monaton!




♈Ĉar via naskiĝmonato alproksimiĝas, vi sentas bezonon fari grandan kontribuon al la esperanta komunumo. Ĉu vi tradukos tutan romanon? Ĉu vi starigos novan esperantan podkaston? Aŭ ĉu vi simple pasigos la tutan monaton argumentante en retejoj pri la plej bona traduko de “AI” en Esperanto? Kio ajn okazos, ni scias, ke vi ne pasos nerimarkite.




♉Vi estas kutime praktika kaj stabila, sed ĉi-monate io skuos vian paciencon – eble la konstanta diskuto pri ĉu oni diru "poŝtelefono" aŭ "saĝtelefono". Vi klopodos konservi trankvilon, sed en la fino, vi estos tiu, kiu kompilas 12-paĝan PDF kun la historiaj argumentoj de ambaŭ flankoj.




♊Vi jam abunde okupiĝas pri diversaj projektoj, sed marto estos speciala monato por vi, ĉar vi hazarde promesos gvidi tri samtempajn Esperanto-kursojn kaj kontribui al kvar revuoj. Via superpovo estas multitaskado, sed ĉu vi efektive sukcesos plenumi ĉion? Nur la steloj scias.




♋Vi sentas nostalgion pri la tempoj, kiam Esperanto estis pli simpla kaj homoj ne kverelis pri la ĝusta uzo de "ili" kiel singulara pronomo. Marto estos tempo por vi retiriĝi en vian komfortan spacon – eble refoje legante vian plej ŝatatan libron el la 1920-aj jaroj kaj esperante, ke neniu petos vin pritrakti la organizon de la venonta evento.




♌Vi ricevas multe da atento en la Esperanto-komunumo ĉi-monate, kaj vi ja ĝuas tion. Ĉu tio estas ĉar vi starigis la plej spektaklan jutuban kanalon pri gramatiko? Ĉu vi finfine sukcesis fari furoran TikTok-videon pri la akuzativo? Kio ajn la kaŭzo, la steloj konsilas al vi ĝui la momenton… sed ankaŭ memori, ke ne ĉiuj volas 40-minutan paroladon pri la diferenco inter “ek” kaj “eks”.




♍ Vi pasigos marton korektante, polurante kaj plibonigante la esperantan lingvouzon de ĉiuj ĉirkaŭ vi. Jes, ni scias, ke la stilo en la oficialaj dokumentoj de UEA povus esti pli glata, sed ĉu vi vere bezonas sendi 3 000 vortojn da sugestoj al la redaktisto? Via detala rigardo estas grava, sed ne forgesu ankaŭ ĝui la simplecon de la lingvo!




♎Vi estas en la mezo de grava ekzistodifina krizo: ĉu Esperanto estas pli bela ol utila, aŭ pli utila ol bela? Ĉu ĝi bezonas reformon, aŭ ĉu la vera solvo estas instrui ĝin al la tuta mondo ĝuste kiel ĝi estas? Dum aliaj argumentas, vi estas tiu, kiu provas konservi harmonion – sed ne surpriziĝu, se vi trovos vin kaptita en 2-hora debato pri la efektiva rolo de la Fundamento.




♏ Vi sentas bezonon fari radikalajn ŝanĝojn en la Esperanto-movado. Ĉu vi fondas novan revolucion en la lingvouzo? Ĉu vi provas persvadi ĉiujn ke la tuta movado devas migradi al *Mastodon* anstataŭ Facebook? Ĉi-monate via pasio estos forta, sed se vi ne volas esti forigita el tri Telegram-grupoj, provu mezuri viajn vortojn.




♐Via deziro vojaĝi estas pli forta ol iam ajn, sed ĉi-monate vi devas alfronti la fakton, ke vi ne havas la monon por iri al la venonta esperantista renkontiĝo en alia kontinento. Eble estas tempo esplori lokajn klubojn aŭ eĉ starigi virtualan *trinkejan rondon* kun aliaj samideanoj. Vi ja scias, ke Esperantujo estas ie ajn, kie troviĝas

esperantistoj!




♑Vi estas kutime tre laborema, sed ĉi-monate vi sentas vin iom elĉerpita. Eble tro da respondecoj en la Esperanto-movado? Eble vi devas preni kelkajn tagojn por fari nenion krom aŭskulti malnovajn esperantajn kantojn kaj ĝui la fakton, ke vi neniam plu devos lerni alian neregulan verbon. Ne estas honto preni paŭzon!




♒

Vi ĉiam estas la unua, kiu proponas radikalajn ideojn, kaj marto ne estos escepto. Via plano instrui Esperanton per memproduktitaj videoj en 3D-holografio eble ne estas realigebla *tuj*, sed vi certe trovos manieron inspiri aliajn. La demando estas nur: ĉu la mondo pretas por vi?




♓ Marto estas via momento brili – vi estas la romantikulo de la komunumo, kiu ĉiam trovas belecon en la lingvo. Ĉu vi tro dramatike citas poezion en viaj sociaj retoj? Eble. Ĉu vi pasigos tro multe da tempo skribante nekredeble belajn, sed lingve diskuteblajn frazojn en via blogo? Sendube. Sed almenaŭ vi alportas iom da arto en la esperanta mondo!




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

# Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands